



# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO  
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO:

Eksterlande: 4 pesetoj  
Enlande: 3 pesetoj

ADRESO:

València, 245-BARCELONA

## LA REDAKCIO ANKAŬ PLENDAS...

*tial ke "Kataluna Esperantisto" aperas hodiaŭ tiom malakurate, kaj ĉefe, malgraŭ niaj klopodoj, tial ke ni ne povis aperigi la n<sup>o</sup>v.-decembran numeron. La kaŭzo de tiu interrompo kaj de la ne tro ĝustatempa aperado de nia gazeto en aliaj okazoj venas kaj ĉiam venis de la sama flanko: la maŝinkompostisto. Rilate lian malseriozecon iun tagon nia ĉefredaktoro diris: "Ne ekzistas ankoraŭ leĝo por puni liajn grandajn mensogojn, ĉar li promesis finpresi la duan eldonon de Kataluna Antologio post tri monatoj kaj li tute senhonte foruzis dek-kvin monatojn." Sed niaj legantoj ne timu. Ni jam foradiaŭis tiun kavaliron kaj fine trovis n<sup>o</sup>van presejon, kiu akiris esperanto-literojn.*

## L'ESPERANTO MARXA

Segons report del doctor Dietterle (director de l'Institut d'Esperanto de Leipzig) a l'any 1927 en més de 7.000 localitats de tot el món existien 126.508 esperantistes, sobre els quals l'estadística en tenia coneixement oficiós. Dels esmentats, 41.751 estaven organitzats en 1.776 entitats o grups esperantistes, dels quals 693 posseïen una biblioteca pròpia. En els grups, durant 1926, hom va organitzar 2.531 cursos. A part d'això, hi havia 16.987 esperantistes que vivien isolats en llocs o no existia o no responia cap grup, i 67.837 esperantistes apartats en les barriades de nuclis urbans amb grups esperantistes. En realitat aquesta estadística és molt incompleta, car existien molts esperantistes en



infinitat de llocs d'arreu del món, on l'enquesta del més amunt citat doctor no va arribar, així com molts grups, la resposta dels quals arribà amb molt de retard. Malgrat tot això, aquestes xifres són bastant impresionants per tal de demostrar que l'Esperanto, com a llengua auxiliar mundial, juga un paper molt important, al costat del qual queda reduït al no-res tot altre sistema de llengua internacional que pretengui obstruir la marxa ascendent de la genial creació del doctor Zamenhof.

L'estadística de l'any 1923 ens mostra més de 1.000.000 d'esperantistes actius, i si copiem l'estadística que la Societat de Nacions va fer l'any 1922, veurem que fins aquella data s'havien venut més de 4.000.000 de gramàtiques d'ensenyament de l'Esperanto, i que en el que anava de segle eren prop de 7.000.000 les persones que havien acabat (no assistit o començat!) un curs de la llengua internacional.

### ESPERANTA LIBRO-LOTTERIO, 1933<sup>a</sup>

kiu okazis la 22an de decembro, aranĝita de  
"Iberia Esperanto-Servo" BARCELONA

#### Premiitaj numeroj:

1<sup>a</sup>; n.º 07,139— 2<sup>a</sup>; n.º 18,343— 3<sup>a</sup>; n.º 24,685— 4<sup>a</sup>; n.º 02,493—  
5<sup>a</sup>; n.º 06,235— 6<sup>a</sup>; n.º 27,113— 7<sup>a</sup>; n.º 08,599— 8<sup>a</sup>; n.º 08,839—  
9<sup>a</sup>; n.º 20,534—10<sup>a</sup>; n.º 33,199—11<sup>a</sup>; n.º 33,262—12<sup>a</sup>; n.º 01,763—  
13<sup>a</sup>; n.º 03,697—14<sup>a</sup>; n.º 20,610—15<sup>a</sup>; n.º 29,935—16<sup>a</sup>; n.º 12,108—  
17<sup>a</sup>; n.º 13,276—18<sup>a</sup>; n.º 30,777—19<sup>a</sup>; n.º 06,802—20<sup>a</sup>; n.º 26,481—  
21<sup>a</sup>; n.º 09,011—22<sup>a</sup>; n.º 02,448—23<sup>a</sup>; n.º 18,338—24<sup>a</sup>; n.º 24,039—  
25<sup>a</sup>; n.º 31,882—26<sup>a</sup>; n.º 33,004

1<sup>a</sup>-A; n.º 07,138 — 1<sup>a</sup>-P; n.º 07,140 — 2<sup>a</sup>-A; n.º 18,342 —

2<sup>a</sup>-P; n.º 18,344 — 2<sup>a</sup>-A; n.º 24,684 — 3<sup>a</sup>-P; n.º 24,686

ATENTU! La premiitoj, kiuj ne pagis siajn biletojn antaŭ la 31<sup>a</sup> de decembro 1933<sup>a</sup>, kaj la delegitoj ne plenumintaj la pagon de sia biletaro, dum tiu limtempo, ne rajtas, kompreneble, ricevi la premion.

F. MONTSERRAT

### NEKROLOGO

D-ro INAZO NITOBÉ mortis en hospitalo de Katalado.

Li estis el la vico de tiuj malmultaj ŝtatviroj kiuj scias sin levi al vera tutmonda nivelo. Li estis honora membro de UEA pro gravaj servoj al nia Esperanto-movado, kiujn li donis dum sia vic-sekretarieco ĉe la Ligo de Nacioj. Li ripozu en Paco!

—Mortis en pasinta novembro nia tre fervora kaj laborema samideano Joan Plana, prezidanto de la grupo "Paco kaj Amo", de Barcelona.

—Ankaŭ ni perdis en lasta decembro nian entuziasman KEF-anon Maurici Orriols, kiu ĉiam estis preta subteni niajn entreprenojn.

Nian sinceran kondolencon al iliaj familianoj.



## ALVOKO AL LA XVI-aj. INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

La Komitato de la XVI-aj Internaciaj Floraj Ludoj vin salutas kaj invitas partopreni la jenajn konkursojn.

### ORDINARAJ TEMOJ

#### *Originalaj Tekstoj*

- I. Originala versaĵo kantanta *Amon*.
- II. Originala Ama verko en prozo.

#### *Tradukitaj Tekstoj*

- I. Traduko de unu el la versaĵoj de la konata kataluna poeto Joan Maragall.
- II. Traduko de la pliantaŭe represita kataluna rakonto "Sobre la mandra..." de Prudenci Bertrana.

### EKSTERORDINARAJ TEMOJ

- I. Premio de la Urbestro de Ripoll, 100 pesetoj: Temo: Laŭvola.
- II. Premio de la Prezidanto de K. E. F., 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- III. Premio de la Estraro de K. E. F., 50 pesetoj. Temo. Laŭvola.
- IV. Premio de "Kataluna Esperantisto". Dumviva abono al la gazeto. Temo: Kiel oni faras bonstilan versan tradukon.
- V. Premio de la grupo "Paco kaj Amo". 50 pesetoj: Temo: Laŭvola.
- VI. Premio de la grupo "Barcelona Stelo", 50 pesetoj: Temo: Laŭvola.

Pliaj premioj kaj temoj sekvos en venontaj numeroj de Kataluna Esperantisto.

Inspiron! al ĉiuj por la gloro de nia Literaturo!

### NOTOJ

I.—La aŭtoroj de la du premiitaj Originalaj tekstoj I-II, kaj tiuj de la du premiitaj Tradukitaj tekstoj I-II ricevos ekzempleron de "Kataluna Antologio" de Jaume Grau Casas, verko rekompenca de la Esperantista Akademio.

II.—Al la aŭtoro de la plej bona teksto (versaĵo aŭ prozaĵo) el la kvar ordinaraĵaj premiitaj verkoj, la Komitato aljuĝos la *Naturan Floron* kaj la rajton elekti reĝinon de la Festo.

III.—La verkoj konkursontaj devas esti verkitaj en bona Esperanto, kaj ne ankoraŭ eldonitaj.

IV.—La solena Festo de la XVI-aj Internaciaj Floraj Ludoj okazos en Ripoll dum la XVII-a. Kongreso de "Kataluna Esperantista Federacio".

V.—La manuskriptoj, kiuj portos surskribitan devizon, devas esti ricevitaj antaŭ la 15 de Junio de 1934 ĉe la adreso de "Kata-



luna Esperantisto", València, 245, Barcelona, kun la jena alskribo; Sro. Sekretario de la Floraj Ludoj; kaj ili estos akompanataj de fermita koverto, kiu surhavas la saman devizon kaj entenos karton kun la nomo kaj adreso de la verkinto.

VI.—La verkoj premiitaj fariĝos propaĵo dum unu jaro de la Komitato de la Floraj Ludoj, kiu zorgos pri ilia publikigo sur "Kataluna Esperantisto" aŭ aliaj esperantaj gazetoj. Permeson por reprodukto dum tiu unua jaro oni devas peti al la Redakcio de K. E.

VII.—Eventuala aljuĝo de "Subpremioj" nur signifas honoran mencion sen rajto al efektiva premio.

*La Prezidanto*  
Francisco Azorín

*La Sekretario*  
Joan Gili Norta

*PETO AL LA GAZETOJ.*—Ni petas niajn kolegojn, ke ili publikigu nian alvokon por ke la konkurson partoprenu esperantistoj el la tuta mondo.

### "SOBRE LA MANDRA..."

Mandra, *faul* en alemany; *pigrizia* en italià;  *paresse* en françès; *laziness* en anglès; significa un estat passiu, amb o sense condormiment, durant el qual l'home nota una manifesta impulsio al badall, a l'estirament i al jeure.

La mandra no ha estat importada; es cria arreu i a Espanya més que enlloc. No és d'origen microbià, per ara; més tard, qui ho sap; sempre hi ha un microbi inesperat a la disposicio d'un savi. Sense una predisposicio latent, la mandra no s'encomana. El sol a l'hivern i l'ombra a l'estiu poden ésser causes ocasionals de la mandra. Les digestions que segueixen als àpats succulents solen produir una pseudo-mandra. La medicacio preservativa de la mandra està per fer. Hi ha qui suposa que un trot sostingut entremig d'un bosc de gatoses, duent poca roba, o millor, sense, seria de resultats segurs. Les secrecions del mandrós no presenten res d'anormal. Els signes físics són nuls. Un poc d'estrabisme i un mig enterboliment de la pupilla, i això és tot.

L'absència de símptomes alarmants i de manifestacions tèrmiques, ja que en la mandra, en comptes d'augment de temperatura més aviat hi ha fredor, han fet suposar si estarien equivocats aquells que la consideraven com una malura. Per nosaltres, no solament no és una malura, sinó que la tenim com una delícia. Encara que tendeixi a immobilitzar el cos, és en absolut inconfusible amb el reuma. Cert que esdevé crònica, però no mata si no hi intervén la fam. Estem mancats d'experiències clíniques en



què s'hagi presentat una complicació tan deplorable. Generalment la mandra cessa quan la fam apunta. Per això ens obstinem a declarar la mandra saludable. I no tindríem pas gens d'escrúpol a recomanar-la a certs individus, l'activitat dels quals és una veritable plaga nacional. Jo no alludeixo pas les joventuts conservadores, ni els poetes massa noucentistes, ni els erudits que gallegen d'ésser-ne, però no serà balder que sàpiguen les nostres teories sobre això.

El veritable estudi de la mandra s'ha d'intentar en el camp filosòfic. Des d'aquest punt de vista, la mandra, com tot, pot ésser considerada com la major de les calamitats o com la més dolça de les virtuts.

El que està fora de tota discussió, és que l'home fou, en un principi, creat per mandrejar. El Paradís terrenal, que en res no s'assemblava a una fàbrica, era en un lloc on Adam i Eva mandrejavien eternament. Déu, el pare, ho havia decretat així. El treball nasqué del pecat. Les fatídiques paraules que convertiren la vida en suor les digué l'Etern, és veritat, però el dimoni les dictava des de l'ombra.

La tendència de l'home a tornar a l'estat de gràcia, o sigui a l'estat de vaga perdurable, és just i lògic. Es cercar, talvolta equivocadament, la divinitat. Potser sigui una temerària irreverència la del mandrós, però ell no té pas la culpa que el diumenge no duri tota la setmana. Diguem de passada que el diumenge sembla com si fos instituit a manera de compensació. L'Etern, pasat el primer acalorament de veure's desobeït per Adam i Eva, degué considerar que n'havia fet massa. Es posà sobre si i fou pietós. Es clar que no podia pas dir "el setè, mandrejaràs", però digué: "el dedicaràs al repòs i a lloar-me a mi", i això per a molta gent, ha vingut a ésser el mateix. El resar, llevat del dormir, és la cosa més assequible als mandrosos, i per alguns, resar i dormir vénen a resultar equivalents. I heus ací com la mandra, amenitzada amb els res i els bons costums, és el mitjà perfecte per a guanyar el cel. El cel alhora és un lloc de mandra. Després d'això se'ns acut una deducció lògica: tot allò que tendeixi a aixecar l'esperit, a sublimitzarlo, a dirigirlo envers la divina gràcia, ha d'ésser realitzat en un ambient de mandra, *celestial* podríem dir-ne. Els cors de les catedrals, els convents, amb aquella quietud i placidesa, donen la pau a l'esperit i enerven el cos, que és allò que constitueix el caràcter distintiu de la mandra sublimitzada. Les oficines de l'Estat són un detestable intent de mandra laica, retribuïda i reglamentada, però en absolut orfe de tota idealització.

Els materialistes i descreguts es contradiuen quan mandregen. La matèria és sempre activitat. Quan dormiu o feu migdiada, la sang, el cor i els òrgans de nodriment fan el seu fet. La mandra en la matèria és la mort. La mandra en l'esperit és delectació. Com més quantitat d'esperit té un home, més sent la



necessitat de mandrejar. Els artistes, els refinats, aquells que de la vida en fan una espiritualitat, són mandres per essència.

La paraula "inspirar-se" no significa pas cosa distinta de mandrejar fecundament. La mandra de l'home, en aquest cas, és tan digna de respecte com la gestació de la dona. No destorbeu el mandra amb excuses nècies de dignitat humana, ni amb altres arguments capciosos, perquè tal vegada destruiu una obra genial. El que sua no crea. Si a un manobre se'l deixés mandrejar, podria esdevenir un creador en lloc d'ésser una màquina. La desaparició dels burots, tard o d'hora, durà fatals resultats. El burot era un contemplatiu i un observador que estava en camí de novel·lista o de místic. Ja ho sentirem a dir.

Ara bé: ¿per què ha estat tan combatuda la mandra? Jo crec que existeix un malentès. Primerament, la mandra a molts els ha perjudicat notablement. ¿Es culpa d'ells o de la mala organització social? No és en aquest lloc on cal discutir això, però valdria la pena d'esbrinar-ho. Després, molts mandres ho han estat amb escàndol. El badall, l'estirament i les poses, si no deshonestes, d'una manifesta baixesa, han desennoblit la mandra. La mandra s'ha de suportar amb dignitat. Un mandra no és pas un vulgar gandul. El gandul és l'home que no té feina ni en vol. El mandra en té de feina, i no la fa, i si la fa, triga a fer-la. Es feina rumiada la del mandra, feina massissa.

En vista d'això dit, cal preguntar encara: ¿fomentarem la mandra? Fomentar-la..., tal vegada no; respectar-la, sempre. El que es dóna al treball ja sap el que es fa. L'harmonia social consisteix a no destorbar a ningú. Estem en camí de suprimir els predicadors i els apòstols.

De la utilitat de la mandra no cal parlar-ne. Es la poesia de la vida. L'enamorat mandreja per pensar amb l' enamorada, el pecador per repenir-se del pecat, el filòsof per filosofar millor, el creient per lloar Déu, el místic per arribar a visionari, i així trobaríem que els actes més dignes i més enlairats de l'home requereixen mandra.

Sols en casos excepcionals la mandra és reprovable. Són pocs aquests casos, però desgraciadament poden esdevenir. En cas de foc, de lladres, de llamps i pedregada, quan es tracta de pagar la contribució al govern, de presentar un compte, i alguns d'altres que quasi sempre es resolen en perjudici de tercer.

La psicologia del mandra es podria resumir en poques paraules. L'ànima del mandra és dolçament selecta: estima, sobre tota cosa, la pau i l'insomni. Qui ha fet avui farà demà. Reposem, que del repòs ne ve el treball.

Deixo a la consideració d'altri la transcendentalitat d'aquesta qüestió, sobre la qual se'n podrien escriure voluminosos llibres. No crec pas haver perdut el temps.



26-A  
UNIVERSALA  
KONGRESO  
DE  
ESPERANTO



*Oficiala invito:* Sveda Trafika Asocio kune kun Sveda Esperanto-Federacio. *Adreso de L. K. K.:* Fredsgatan 4, Stockholm, *Poŝta ĉekkonto:* N-ro 50443, Stockholm. *Bankkontoj:* Svenska Handelsbanken, Stockholm 16; Sundsvalls Enskilda Bank, Fredsgatan 4, Stockholm. *Kotizoj:* Ordinara kotizo estas 25.—sved. kronoj.

**FRUPAGANTOJ** (ĝis 31 marto 1934) pagos nur 20.— sved. kr. **MALFRUPAGANTOJ** (post 1 Julio 1934) pagos 30.— sved. kr. **JUNULOJ** (malpli ol 16-jaraj) 5.— sved. kr. **BLINDULOJ SEN-PAGE.**

*Kongresejo:* Laborkunsidoj kaj fakaj kunvenoj okazas en la sveda parlamenta domo, la solenaĵoj en la koncerta domo, la balo en la urbodomo de Stockholm.

*Manĝo:* En Stockholm ekzistas tre multaj popularaj, bonaj restoracioj, kie oni povas ricevi tagmanĝon por 1.— sved. kr. En luksaj restoracioj tagmanĝo por 2.50—3.50.

*Loĝejoj:* A: luksaj hoteloj — Sved. kr. 10—20. B: komfortaj hoteloj — kr. 7—10. C: simplaj hoteloj — kr. 5—7. D: modestaj hoteloj — kr. 4—5. E: komunaj loĝejoj por 6 ĝis 20 personoj — kr. 1.25—2.

*Forvoja rabato en Svedlando:* Por la vojaĝo al la kongreso es-



tas jam interkonsentite pri 25 % rabato, sed L. K. K. esperas pli-grandigi la rabaton.

*Favoraĵoj:* Ĉiu kongresano ricevos senpage la belan svedan Esperanto-Gazeton ekde la aliĝo. Do, ju pli frue vi aliĝas, des pli multe vi gajnas!

*Kongresarangoj:* Teatraĵo, koncerto, balo, ekskursoj ktp., laŭ programo kiu postsekvos.

*Fakaj kunvenoj:* Pri anoncigo de fakaj kunvenoj kiel eble plej baldaŭ ni petas.

*Oni vivas malmultekoste en Stockholm nuntempe.*

## LA UNUECIGO DE LA ESPERANTO-MOVADO

### “INTERKONSENTO DE KOLONJO”

Universala Esperanto-Asocio, Konstanta Rezentantaro de la landaj Esperanto-asocioj, kaj Universala Esperantista Federacio, interkonsentas pri la ĉi subaj aranĝoj:

I.—Universala Esperanto-Asocio estas la tutmonda organizaĵo Esperantista, reprezentanta la Esperanto-movadon kaj organizanta la universalajn kongresojn.

II. — La landaj Esperanto-Asocioj aligas siajn membrojn al U. E. A., se ili plenumas la jenajn kondiĉojn:

1. posedi organizan formon (regularon, konsiston de komitato, k. c.), kiu vidigas klare, ke temas pri landa asocio neŭtrala.
2. havi minimume 100 membrojn.

Pri la akcepto decidas la Komitato.

III.—La landaj Esperanto-Asocioj aligas siajn membrojn al U. E. A. laŭ la jenaj kondiĉoj:

1. ili pagas jarkotizon de Sv. fr. 0,50 por ĉiu el siaj regulaj membroj; ĉi tiuj membroj estas simplaj membroj de U. E. A.; ili rajtas ricevi la internacian membrokarton kaj uzi la servojn de la delegitoj pri vojaĝhelpo kaj informpetado.

2. la landaj asocioj pagas aldonan kotizon por tiuj membroj, kluĵ deziras ricevi la jarlibron aŭ la jarlibron kaj la gazeton de U. E. A.; ĉi tiuj membroj estas nomataj membroj aktivaj. La ĉi tiuj membroj estas nomataj membroj aktivaj. La landaj asocioj sin devigas varbi kiom eble plej multe da tiaj membroj.

IV.—En landoj, kies asocio aligis siajn membrojn, oni aldonas al la kotizo el ĉiu kategorio proksimume 50 % de la normala kotizo de la nuna membro kun jarlibro, por tiuj membroj, kiuj ne apartenas al la landa asocio. Tamen la ĝisnunaj membroj de U. E. A. ne apartenantaj al la landa asocio povas resti membroj laŭ la ĝisnunaj kondiĉoj, ĝis fino de 1936.

V.—La landa asocioj prenas sur sin la administradon de la



membroj en sia lando, laŭ la reguloj de la Centra Oficejo, kaj nomas ĉefdelegiton interkonsente kun U. E. A.

VI.—La landa asocio nomas la lokajn delegitojn interkonsente kun la ĉefdelegito kaj komunikas la liston al la Centra Oficejo.

VII.—La Internacia Komitato de U. E. A. konsistas el:

(a) Komitatanoj elektitaj de la landa Asocioj aligintaj siajn membrojn:

(b) Komitatanoj elektitaj de la lokaj delegitoj en la landoj, kies landa asocio ne jam aligis siajn membrojn kaj en la landoj, kie ne jam ekzistas landa asocio;

(c) Komitatanoj elektitaj de la komitatanoj sub (a) kaj (b).

Ĉiu landa asocio kun minimume ducent ĝis mil membroj elektas unu komitatano, kaj plian por ĉiu komencita milo da membroj, por kiuj ĝi pagis kotizon por la pasinta jaro.

La lokaj delegitoj de la landoj, kies landa asocio ne jam aligis siajn membrojn aŭ kie tia asocio ne jam ekzistas, elektas grupe po unu komitatano por ĉiu kvincento aŭ kemencita kvincento da membroj.

La komitatanoj sub (a) kaj (b) povas nomi komitatanojn sub (c) ĝis la triono de sia propra nombro.

Ĉiuj komitatanoj havas samajn rajtojn kaj devojn.

VIII.—La fakaj societoj, institucioj, k. t. p. povas sin enskribigi kiel partoprenantojn en la ĝenerala Esperanto-movado, kontraŭ fiksita pago.

IX. — Okaze de ĉiu Universala Kongreso de Esperanto kunsidas "Konsilantaro de la Esperanto-Movado." Ĝi konsistas el: la komitatanoj de U. E. A., la reprezentantoj de la aliĝintaj landaj asocioj havantaj malpli ol 200 membrojn, la ĉefdelegitoj aŭ iliaj reprezentantoj, la honoraj membroj, la dumvivaj membroj, la patronoj, kaj la reprezentantoj de la asocioj kaj institucioj registritaj kiel partoprenantoj en la ĝenerala Esperanto-Movado. Tiu Konsilantaro esploras la jarraportojn pri la stato de la movado, konsideras proponojn pri disvastigo kaj utiligo de la lingvo, kaj priparolas programon de laboroj entreprenotaj. Ĝi decidas per plimulto de la ĉeestantoj en formo de deziresprimoj, kiujn ĝi transdonas al la Komitato de U. E. A.

X.—Post sia likvido I. C. K., K. R., kaj U. F. E, transdonas al U. E. A. siajn havaĵojn kaj dokumentojn. La Komitato kaj Centra Estraro fiksos la novajn devojn de la ĝisnunaj direktoroj kaj oficistoj de I. C. K. kaj de U. E. A.

XI.—Necesaj ŝanĝoj en la regularo de U. E. A. estos tuj farataj laŭ la ĉi-supraj aranĝoj. La nuna Komitato de U. E. A. sendos la ŝanĝojn al la delegitoj, por ke la voĉdono estu finita je la fino de Oktobro 1933.

U. E. A. sendos la ŝanĝojn al la delegitoj, por ke la voĉdono estu finita je la fino de Oktobro 1933.



XII.—La landaj asocioj elektos siajn respektivajn komitatanojn antaŭ la 15-a de Oktobro 1933.

XIII.—La neceso estos farata, por ke la nova aranĝo ekfunkciu je la 1-a de Novembro 1933.

Kolonjo, la 4-an de Aŭgusto 1933.

*Tiu ĉi "Interkonsento" pri la unuecigo de la Esperanto-Movado estis subskribata, en la solena ferma kunsido de la 25a Universala Kongreso, de jenaj samideanoj:*

Ed. Stettler, Frans Schoofs, D-ro A. Vogt, Johannes Karsch, Robert Robertson, Arnold Behrendt, Louis Bastien, P. W. Baas, Einar Dahl, Cecil C. Goldsmith, J. R. G. Isbrücker, A. Clavenna, P. Petit, M. Inouye, Dr. Julian Loyola, Georgo Canuto, M. De Ketelaere, Ildefonso Falção, Arne J. Tharaldsen, D-ro Ernst Mayer, Charlotte Jablonski, Paul Blaise, Adolf Münz, M. Moy Thomas, Paolina Mellina, Schmalzl, S. Alberich, Jofré, Dro. R. Mader, Hans Jakob kaj Robert Kreuz.

## AKADEMIO KAJ LINGVA KOMITATO

Ni eltiras el cirkulero la jenajn sciigojn:

Por okupi la vakantan postenon de Prezidento de la Akademio estis elektita Sro. M. Rollet de l'Isle, kaj Sroj. B. Migliorini kaj P. Nylén kiel vicprezidantoj.

Estis reelektitaj la jenaj membroj de la Lingva Komitato: Sroj Aymonier, Rollet de l'Isle, Won Kenn, L. Zamenhof, Blicher, Chavet, kaj estas novaj membroj, F-ino. Jane Baird, Sroj. Sevak, Jirkov, Orengo, O. van Schoor, Jansson, Mihalski, Domingues, Cseh, Bugge Paulsen, Bonnevie, Madham, Couteaux, Porto Carreiro Neto kaj Archdeacon.

## HISTORIA ANEKDOTO

En la tempo de la regado de la hispana reĝo Ferdinando VII, la militistaro ricevis tre malakurate sian soldon. Dum vintra tago okazis iu solena akcepto ĉe la reĝa palaco, kaj la generalo Castaños, la venkinto de la Bailén-batalo, sin prezentis vestita kun blanka pantalono. Vidinte tion, la reĝo demandis lin:

—Ĉu vi frenezigiĝis, Castaños? Ĉu vi eble ne scias ke la nuna sezono estas vintro?

—Reĝa Moŝto, —respondis la generalo— la nuna sezono estas vintro por iuj; mi troviĝas meze de somero, kaj kiel pruvo mi povas diri, ke la lasta soldo kiun mi enspezis apartenas al la monato julio.

*Rerakontis: Maria JULIVERT*



## ESPERANTO KAJ LA NACIAJ LINGVOJ

Al la peto de Sro. Dalmau, farita en lia artikolo apêrinta sur la numeroj 194-195 (majo-Junio 1933) de "Kataluna Esperantisto", ni ricevis la jenan daŝkindan kunlaboraĵon:

ANGLE	ESPERANTE
Adjust. Maladjustment.	Alĝustigi.
Content. Malcontent (adj.)	Kontenta. Malkontenta.
Benediction. Malediction.	Beno, malbeno; diri.
Benevolent. Malevolent.	Voli bonon. Malbonon.
Formation. Malformation.	Formo. Malformo.
Influence. Malinfluence.	Influo. Malinfluo.
Odour. Malodorous (adj.)	Odoro. Malodora.
Practice. Malpractice.	Praktiko.
Treat. Maltreat.	Trakti, malbonuzi.

*Aliaj vortoj similas al Esperantaj vortoj:*

Amicable = friendly.	Amika.
Animated = lively.	Anima aŭ animplena.
Fidelity = faithfulness.	Fideleco.
Avaricious = miserly, mean.	Avara.
Agreeable = pleasant.	Agrabla.
Dextrous = skilful.	Dekstra.
Felicitous = happy. (tago, okazo.)	Feliĉa.
Hazardous = dangerous.	Hazarda.
Stellar = sterry.	Stela.

Unu angla vorto devenas el latina fonto, la alia tre ofte el ĝermana-saksa fonto. La signifoj malmulte diferenciĝas *Dextrous* sendube unue signifis *labori per dekstra mano*. (Ekz: franca *gauche* en angla ligvo = *mallerta*.)

Emma L. OSMOND

## LA ETERNA AMO

(Premiita en Vendrell kiel *Ama* verko en prozo)

Dum neforgesebla kongresa semajno en Genevo mi sidis ian trankvilan vesperon sur benketo ĉe la insulo de J. J. Rousseau kun vi, profundokula alilanda samideanino.

Nemulte ni parolis. Plenplenaj ni estis de feliĉo pro la unuafoje de ni ekvidita miraklo. Tiom da nacioj pace kunlaboris dum la Esperanto-Kongreso, klare interkompreniĝis, konkorde ĉion faris.



Ni estis ravitaj ankaŭ de la bela bildo, kiun prezentas Genevo, la spirita centro de la nuntempa vivo internacia.

Ni estis ĝoje surprizitaj, ke jen ni ambaŭ, el diversaj landoj, parolantaj hejme malsamajn lingvojn, alimaniere edukitaj, okaze konatiĝis dum la Esperanto-kongreso kaj jam post duonhoru estis kvazaŭ delongaj bonaj amikoj.

Kia feliĉo povi alproksimiĝi al homo, de kiu apartigis vin ĝis nun miloj da kilometroj, dekmiloj da antaŭjuĝoj kaj la dikaj muroj de divers-lingveco!

Kia granda, nemezurebla feliĉo!

Ĝi eniĝis niajn korojn kaj kaptis ilin forte.

Ni eksentis nin tiom proksimaj, karaj unu al la alia

Vi ekpremias vin al mi, milde, karase.

Ni silentis.

Ĉiu vorto nur rompus la harmonion tiumomentan de pensoj, sentoj, aspiroj.

Ni amis nin tiam reciproke. Sincere. Arde. Pure.

Ni amis tiam ĉiujn. Ĉiujn homojn. Kiaj-ajn ili estas. Ĉiun eron de la bela naturo. Ĉion, kio atestas pri vivo, ĝojo, feliĉo.

Jaroj forpasis de post tiu neforgesebla momento.

Mi ne scias, kie vi estas, bela fremdulino.

Mi eĉ ne memoras vian nomon, kiun mi eble ankaŭ neniam konis.

Mi ne vidas vin plu dum miaj ĉiujaraj mondfestoj.

Sed ĉiujare, dum la Kongreso, mi ree travivas la profundan emocion de mia unua vizito al la kunveno de la heroldoj de reunigita homaro.

En Edinburgo, Dancigo, Antverpeno, Vieno, Budapeŝto, Oksfordo, Krakovo, Varsovio, Bialistoko aŭ Parizo, ĉie mi vagas kun vi, ĉarma polino, francino, ĉeĥino, hispanino, grekino, japanino...

Eble ĉiujare kun alinoma, alilingva, alinacia.

Sed tamen ĉiam kun la sama. Ĉiam kun virino. Kun virino, kiu ja estas la simbolo de vivo, juneco, beleco kaj ĉefe de amo, amo vera, arda, senlima.

La tempo rapide pasas kaj dronas en la eterneco. Ekgriziĝas jam miaj haroj, eksulkiĝas la frunto.

Sed ĉiam eterne freŝa restas la koro. Ĉiujare pli kaj pli disbrulas en ĝi la fajro de l' amo, de granda amo al la suferanta, malfeliĉa, malpacanta homaro, kiun ni volas savi, ni, la kavaliroj de la Verda Stelo.

Ne estingiĝas la fajro de l' amo en mia koro. La fajro, ekflaminta tiun trankvilan vesperon ĉe la bordo de Lemana Lago en Genevo dum mia unua Esperanto-kongreso.

Jakobo ŜAPIRO



## BIBLIOGRAFIO

LA SORĈISTINO EL KASTILIO, (Historia bildo.) de Salom Asch, el la juda trad. I. Lejzerowicz, 148-paĝa libro, eld. "Literatura Mondo" (kolekto de AELA), prezo: 3'50 sv. frk.

Se ĉiuj eldonotaj libroj de AELA havus la nivelon kiel la jam du aperintaj, "Hungara Antologio" kaj tiu kiun ni nun recenzas, nedubeble nia literaturo alirus per grandaj paŝoj apud la lokon okupitan de la grandaj kulturlingvoj.

La verko de S. Asch tuj revivigas en via memoro la similajn epizodojn priskribitajn en la verko de Sienkiewicz "Quo vadis?", sed kun la roloj turnitaj. Nerono estas anstataŭta de Paŭlo IV., la katabomboj de la judaj getoj, la cirko de la publikaj "aŭto da fe", la kristanaj martiroj de la judaj, la komencanta kristana epoko, de la ĥaosaj tempoj de Luter, Calvin, de la Inkvizicio... Ni ne scias kial, sed LA SORĈISTINO EL KASTILIO pensigis nin pri verko de la pola verkisto B. Prus: LA FARAONO. En ili ambaŭ pulsas tia sento *anti-Quo vadis?*... Eble, ne hazarde Henryk Sienkiewicz estis polo; kaj, kiu kuraĝus deĉifri *hejmajn* disputojn en formo de romanoj?

Ŝalom Aŝ, aŭtoro kiu meritas altan lokon, kreis ne romanon, ne historian bildon (kia dusenca subtitolo por la verko!), sed vi-pon kontraŭ la tiutempa Eklezio, kontraŭ la fanatika, senmorala, sangavida popolo de Romo. Aŝ ne bezonis —kiel Sienkiewicz— krei paron de junaj geamantoj por siaj priskriboj, kun la celo plilongigi la romanon kaj kormoligi sopiremajn fraŭlinojn kaj ridetigi bigotajn avinojn, ne. La sinsekvaj okazintaĵoj de lia rakonto estas skribitaj per tre senriproĉaj objektivaj trajtoj. Neniaj superfluaĵoj tra la tuta teksto. Du sensignifaj personoj donas animon kaj korpon al la tuta novelo: Pastilla, la pentristo, kaj Jefta, la juda diinsimila knabino, la sorĉistino kiu alprenis formon de diina korpo por savi la judojn, laŭ diro de la roma popolo kaj eklezio. La verkista talento de Aŝ konkeras al si la tutan streĉitan atenton de la leganto, de la komenco ĝis la fino, kies lasta paĝo enhavas tian neatenditan kaj emocian scenon, kian malfacile vi trovus en multaj majstraj verkoj.

La verko trovis indan tradukiston. I. Leizerowicz lerte kaj senembarase tradukis ĉiujn malfacilajn partojn de la priskribitaj scenoj. Nur dank' al lia flua esperanto la traduko konservas la freŝecon de la originalo, kies vortriĉeco devigis la tradukinton uzi kelkajn neologismojn por eviti strangajn kaj longajn vortkunmetojn. Nur ni volas atentigi la tradukinton pri ne korekta *parolis kastilie* —sur paĝo 23—, anstataŭ *kastile*, kaj sur paĝo 136: *Sed en la irado ŝi estis tiel ŝvebeca*, anstataŭ *gracimova*. Ankaŭ sur p. 15 estas iu "kompostista salto", kiu sensencigas du plenajn frazojn.



KIKI, originalaj rakontoj de Emma L. Osmond, du kajeroj de Esperanto-Junula Biblioteko, eldonejo de Heroldo de Esperanto, Koln, prezo de ĉiu kajero, 0'25 gmk.

Tiuj du kajeroj entenas 7 ĉapitrojn el la 14, kiuj konsistigas la tutan novelon de nia konata verkistino S-ino. Osmond, kiu per sia glata kaj facilmova stilo ĉizis kelkajn scenojn de la travivaĵoj de *Kiki*, la juna heroino de tiu ĉi novelo kiu avidas malkovri al si, meze de granda indiferenteco al ŝiaj demandoj, la eksterajn sinsekvajn impresojn, kies efektojn sur la delikatsenta animo de *Kiki* la aŭtorino pentras per paragrafoj plenaj de infana percepto, dank' al kiu la legaĵo estas saturita de profunda simpatio al kristana bono.

La celo kaj argumento de la rakontoj, kune kun la flua kaj korrekta lingvaĵo, pretigis rekomendindajn kajerojn por niaj komencantoj. Nur ni trovis du aŭ tri preserarojn, kiuj neniel makulis la ceteran tekston. Ni konsilus uzon de la jam ekzistanta esperantistigita. *Noaho*, austataŭ *Noa*, kiun en latinaj lingvoj oni skribas *Noé*. Ni preferas *brulŝtiparo*, kiel pli ĝustan ol *brulamaso*, kaj kelkloke la konkludan konjunkcion *do* bone anstataŭus pli preciza *kaj*.

VORTOJ DE KAMARADO LANTI (1). Eldono de SAT, 23, rue Boyer, Paris-20è. Libro 190-paĝa, 13-19 cm.

La libro de kamarado Lanti estas akra tranĉilo kontraŭ ĉio nunstaranta. Li observas ĉion diligente, mezuras, taksas, kaj se ĝi ne akordiĝas al la sennaciaj kaj klasbatalaj principoj, li tuj metas ĝin en la *gilotinon*.

La libro estas kolekto de artikoloj aperintaj sur la SAT-organo en la daŭro de la jaroj 1920-1930. Ĝi prezentas al ni plej diversajn temojn, grupigitajn en naŭ sinsekvaj rubrikoj: Mondlingvo, Organizado, Edukado, Sennaciismo, Socialpolitiko, Pacismo, Priskriboj Polemiko kaj Pensoj. Nur dank' al la kompilinto L. Baumer, la verko havas ian unuecon en sia diverstema enhavo. Tio ĉi multe faciligas la komprenon de la libro, kaj eĉ kelkfoje oni forgesas ke la legaĵo estas tranĉitaj pecoj de diversdataj gazetartikoloj.

Kamarado E. Lanti sin prezentas en tiu ĉi libro kiel vera agitanto, ruza polemikisto. Li uzas la Platonan sistemon prezenti al si kontraŭdiranton, al kiu li toleras nur kelkajn komencajn vortojn aŭ demandojn. Poste la alparolinto devas ŝirmi sin de la toranta ideo-flueco de Lanti.

(1) *Mi faris tiun ĉi recenzon jam antaŭ du jaroj kaj ĝi neaktualigis post sesmonata interrompo de KE. Nur tial ni forlasis ĝian publikigon. Sed tiom ofte interesigis pri ĝia sorto mia amiko Grau, ke hodiaŭ mi decidis komplezi lin, kiu siaflanke ankaŭ recenzis la verkon de le plorata, Cart, la vigla, june maljuna Prezidanto, laŭ Lanti-esprimo.*



Se ni flankenlasas la politikan enhavon kaj atente observas la stilon kaj lingvaĵon de la aŭtoro, oni devas konfesi ke li vere manumas la ligvon, kiu ĉiel ajn klare esprimas liajn pensojn, kaj ofte ĝi perfekte etendas la reton al tiu, kiu lin intencos kontraŭdiri. Nur necesas legi liajn priskribojn pri vojaĝo al Turkujo por konstati lian literaturan kapablecon.

Diversfoje li tro uzas sian aplomban konon de Esperanto kaj permesas al si enkonduki novajn formojn, kiujn ni tute ne ŝatas. Li tro sisteme forigas sufikson *ec*; ekz.: *popularo*, *klaro*, k. a. Ni en certaj okazoj preferus uzon de *disvolviĝo* anst. *malvolviĝo*.

Plena esperantigo de ĉiuj personaj nomoj estas nerekomendinda tasko por esperanto kaj por ĉiuj naciaj lingvoj, ĉar ĝusta elparolo estas ĝenerale neebla. Ni preferus, kiel sistemon, la nacia ortografion tute neŝangitan, kaj en interkrampoj, la proksimuman esperantan elparolon: Clemenceau (Klemanso'), Cromwell (Kromüel), k. t. p.

LJUBLJANA, 14-paĝa riĉe ilustrita faldprospekto kun urboplando. Senpage ricevebla de Esperanto-Klubo, Ljubljana, Jugoslavio 1933.

UNUA SLOVAKA KRISTANA PRINCO, laŭ verko de Dro. J. Hodál, kompilis kaj el la slovakaj tradukis St. Kamaryt, 1933. Eldonis Komitato de Pribina-festoj en Nitra. Senpage ricevebla de Slovaka Porfremdula Asocio en Bratislava, Hotelo Savoy, Ĉeĥoslovakujo.

INTERNACIA HEJMO ESPERANTISTA, 8-paĝa prospekto ilustrita pri la esperantista restadejo en Aspremont (A. M.), Francujo. Bele presita kaj kun interesaj informoj pri nia esperantista hejmo, fondita kaj mastrumita de la afablaj gesinjoroj Yelland.

PRAHA, ĉefurbo de ĈSR, belega 12-paĝa prospekto eldonita de ĉeĥoslovaka Asocio Esp. Senpage ricevebla ĉe: Ĉeĥoslovaka Asocio Esp. Praha VII, Sacharska 333.

KOPENHAGO, la ĉefurbo de Danlando, riĉenhava prospekto 10-paĝa kun ravaj ilustraĵoj eldonita de Dana Turista Unuiĝo (Turistföreningen for Danmark, Vestre Boulevard 18. Kopenhago).

AŬSTRIO, bela fald-gvidlibreto kun ilustraĵoj kaj mapo eldonita de Federacia Ministerio por Komerco kaj Trafiko, Vien. Ricevebla ĉe ĉiu vialanda inform-oficejo aŭ ĉe Esperanto-Muzeo, Vien I. Neue Burg, Heldenplatz.

ĈEĤOSLOVAKUJO, ilustrita gvidilo pri ĉeĥosl. fervojoj, 11 mapoj kaj 140 bildoj, senpage ricevebla ĉe: Ministerio de Zeleznic, Praha.



BINGEN apud Rejno, belan gvidlibron eldonis Magistrato de urbo Bingen, Germanujo. Ĉiu rajtas peti ĝin ĉe Magistrato.

JARLIBRO DE LA LINGVA KOMITATO, 1932-3. 32 p., 2 fr. fr., ĉe Esperantista Centra Librejo, 11 Rue de Sevres, Paris 6. Enhavas la kutiman regularon kun klarigaj notoj, nomaron de L. K.-anoj. kaj klarigon pri la Zamenhofa sistemo de land-nomoj.

### TRA LA ESPERANTA GAZETARO

*Novaj gazetoj.* "La Suda Stelo", organo de la esperanto-movado en Jugoslavio, 12 paĝoj en granda formato, aperas de la komenco de 1933. Tre interesa kaj bone redaktita gazeto, kiu celas unuigi kaj fortigi la jam rimarkindan movadon en Jugoslavio.

"La Pirato", bonhumora kaj sprita gazeto sub la direktado de Sro. Raymond Schwartz; 15-paĝa, monata. Jarabono, 12 fr. frk. Administracio: 9, rue Hallé, Paris-14. Jen gazeto kiu aperas regule de antaŭ unu jaro kaj kiu liveros al vi la necesan trinkaĵon por *ataki* vian malgajecon. La direktilestro de tiu pirato-ŝipo estas tre bone konata de niaj s-anoj. pro liaj antaŭaj *kaperadoj* sen velŝipo. Neimageble estas, do, pensi kion li kuraĝos fari nun jam kun propra ŝipo dum ĉiuj el liaj monataj *alfluoj*.

"Hindujoj", trimonata gazeto, red. S-ino. Erna Sindhvad, 37, rue Vandekindere, Uccle (Belgujo). Hektografita propaganda gazeto pri la nacia movado de Hindujoj, kie 300 milionoj da loĝantoj estas subpremitaj de fremdaj potenculoj.

*Pri aliaj gazetoj.* "Brazila Esperantisto": Reaperas tiu malnova gazeto kun sia tradicia rimarkinda enhavo. En lasta numero ĝi sciigas pri grava paŝo farita de la brazila poŝto, kiu eldonis ilustritajn poŝtkartojn kun teksto en esperanto, imitinte per tio la poŝtojn de Lihtenŝtejno kaj Hungarujo.

"Telegramo", aperas en Plovdiv (Bulgarujo). Laŭ la subtitolo, ĉiutaga gazeto, kiu en majo 1933, post tri jaroj de sia fondiĝo aperis 77-foje! Ni ricevis tiun cititan numeron kun la jena noto:

"Ĝis nun vi eĉ ne menciis pri nia bulteno". Ni silentis, ĉar ni ne ŝatas mensogi aŭ trompi niajn s-anojn. Sed antaŭ tiu incito ni malkaŝe diras, ke tio ne estas gazeto nek io simila. Pli bone simpla folio malbone presita kaj redaktita.

"Nia Vivo", organo de la grupo Frateco el Saragozo eldonis eksterordinaran numeron dediĉitan al la solenigo de la 25. datreveno de l' fondiĝo de la grupo. Superflue estos aldoni ke tiu numero havas abundan tekston kaj belan kovrilon. Al la gazeto kaj vigla grupo ni deziras senfinan ekzistadon kaj prosperon.

Edca.